

Monata Informilo de Sovetlanda Esperantista Movado

D E C I D O J de la 7-a Konferenco de B E J M - Konsilantaro.

1. Aprobu kaj taksu kontentiga la laboron de la Komitato en 1972-73.
2. Aprobu la laboron de traduka, poezia, radionatura fakoj kaj korespondanta servo.
3. Akceptu al B E J M la frupon de Keldinai kaj kandidato la grupojn de Talgar, Tŭvin, Siktivkar kaj Sverdlovsk.
4. Atentigi pro negufiĉa laboro la B E J M-grupojn de Kaunas, Liepoja, Siauliai, Zeporojje.
5. Riproĉi pro malaktiveco la B E J M-grupojn de Kaspisk, Kiev, Krivoj Rog, Luck, Tallin, Viljandi.
6. Ananci ekster B E J M la E-grupojn de Avdeevka, Gambul, Karaganda, Minsk, Njasenaj, Simas, Strij.
7. Konfirmi la rezultojn de la socialisma konkurado en B E J M:
 - I-a loko - U f s (premiu per E-tajpilo kaj trensira Zamengof-pokalo);
 - II-a loko - K l e j p e d s (premiu per valora librodonaco);
 - III-a loko - R i s a (premiu per plena iljustrita vortaro).
 Esprimi laŭdojn al B E J M-grupojn de Ufa, Klajpeda, Riga, Vilnius, Ivenovo, Barnaul, Omsk, Ŝmelnickij, Moskvo, Ĝarjkov.
8. Elekti la B E J M-Komitatojn en jena konsisto:
 - Prezidanto - A. Ĝanĉirov (656099, Barnaul -99, ab.k. 11);
 - Unua vicprezidanto - V. Aroloviĉ (121019, Moskva, G-19, do vostr);
 - Vicprezidanto pri sekretariej aferoj - V. Silas (323009, Litovio, Vilnius - 9, Daukanto 8-9);
 - Vicprezidanto pri financoj - A. Viŝgirdas (Litovio, 235800, Klajpeda, ab.k. 167);
 - Vicprezidanto pri kontaktoj kun eksterlando - D. Cibulevskij (310024, Ĝarjkov - 24, Ĝajkovskogo - 25/2 25 - 11);
 - Vicprezidanto pri fakaj aferoj - V. Laptev (454001, Ĝeljabinsk, Sverdlovskij pr; 39-4);
 - Vicprezidanto pri laboro en lernejoj - N. Starodubcev (340092, Doneck, Polockaja 202 - 37);
 - Vicprezidanto pri tenderoj - B. Kolker (450025, Ufa, abonkasto 162);
9. Konfirmi novajn fakestrojn:
 - Lanta fako - N. Ŝĉerbakova (140051, Mosino, Mossovetn 29-15, Moskvo).
 - Magnetofona fako - A. Rogov (281401, Ŝmelnickaja obl; Ŝmelnickij rajon, Ivenkovci);
 - Bibliografia servo - V. Cvetkova (197137, Leningrado, Ĉkalovskij 60-97).
- La postenoj de estro de scienc-teknika fako lasi provizore vaki.
- La foten fakon likvidi. Komisiu gvidadon de ceteraj fakoj al la melnovsk fakestroj.
10. Konfirmi monatan informilon de B E J M "Aktuale" kaj komisiu ĝian redaktadon kaj dissendadon al la klubo de Barnaul.
11. Komisiu kompiladon kaj dissendadon de "Akordo" al la klubo de Riga.
12. Por solvi sur la scienca bazo aktualajn problemojn de Esperanto iniciati kreon de Scienc-esplora Instituto de Esperanto sur socia bazo.

- 11 -
13. Pri la lokoj de la 9-a SRJE - Referenco kaj SEJT-16 decidu la komitato ĉi la 1 de januaro 1974.
 14. Komitaj esplori eblecoj organizi la 9-an SRJE-Konferencoj kaj la 17-an SEJT al la kluboj de Barneul kaj Ustj-Kamenogorsk.
 15. Komitaj al Klajpeda E-klubo organizi la 9-an SEJT en 1974. kaj al la E-klubo de Ufa esplori eblecojn organizi la 6-an SEJT en 1975.
 16. Rekomendi al la kluboj revenigi komencantojn al la SRJE-Konferencoj.
- ENCORE - KEBERCISSS(LATVIO), la 15-an de aŭgusto, 1973.

LA 42-a JUNULARA NEFORNESEBLA.

Somere pasis, sed en ĉies koro ĉi lasis iun neforgeseblan periodon. La plej grava somera evento en vivo de junaj sovetaĵ geesperantistoj estis organizo de la 15-a Soveta Esperantista Junulara Tendaro (SEJT-15). La Tendaro estis organizita apud Riga golfo de Latvio, en pitoreska lago Kastercisga.

Prekuzeco de Esperantistoj estis sentebila jam en Riga atacidomo. Tie kaj alie aŭdiĝis esperanta parolo, ofte sonis vortoj "Saljutu, Komarado!". Aĝaj homoj demandis interese, en kiu lingvo vi parolas? Ĉiuj klare ĉiuj diris al infanoj: "Ĉe, eksterlandanoj", kaj ili tuj kolektive diris ĉirkaŭ ni. Mi - tio estas geesperantistoj el tuta Sovetio: Leningrado kaj Tbilisi, Petropavlovsk-sur-Kamĉetka kaj Tallin, Moskvo kaj Barneul, Ufa kaj Kiev, Omsk, Ĉeljabinsk, Ĥaŝkala, Paŝkebt, Klajpeda, Ivanovo kaj multaj aliaj. Ĉi tien, en profundan okcidenton de nia lando venis reprezentantoj el pli, ol 50 urboj.

La tendaro solene malfermis k-de Ajvara Kalinŝ, vicprezidento de Riga E-klubo, kies geesperantistoj organizis ĉi tendaron. En sia parolo li saljatis ĉiujn partoprenantojn de SEJT-15 kaj esprimis esperon pri sukcesa laboro en la tendaro kaj pri egreble rigeso dum ĉia daŭro. Rankantajn petolojn havis prezidento de Soveta Esperanta Junulara Novado (SEJN) k-de Gencarov, unus vicprezidento de SEJN k-de V. Ĥroloviĉ kaj reprezentantoj de pljaraj urboj de Sovetio. En ĉies vortoj estis sentebla verma dankemo al la organizantoj de la tendaro kaj espero pri fruktodona laboro.

Ĝec, la programo de la tendaro estis tre riĉa kaj vasta. Ĉi enhavis diversajn gravejn, seriozajn, amuzajn kaj sportajn erojn: funkcioj Komara Universitato, kiu gvidis doktoroj de sciencoj - k-de Moskoviĉ; estis organizitaj ĉiujraj paroligaj kursoj; Interese pasis k-viktoriaj kaj konkurso de interpretistoj. La tendaranoj organizis bal-on al kollektiva tago ĉiuj laboris en grupoj de rajhara kollektivo. Ĉi somere la 1-a fojon en historio de Sovetaĵ E-tendaroj estis organizita kaj sukcesa funkcio tradukista kurso, kiu visitis pli, ol 20 homoj. La kurso estis dividita je du partoj. En la unua periodo al la visitantoj estis proponita la sama rakonto, tradukita de diversaj homoj en Esperanto, kaj la partoprenantoj devis kompari la tradukojn, indiki erarojn kaj elekti la plej bonan tradukon. En la dua periodo la partoprenantoj mem esperantigis rusan tekston kaj elektis la plej ĝustan tradukon. En ambaŭ partoj de la kurso estis atentata precizeco de la traduko kaj stilo de la aŭtoro. La tradukista kurso havis pozitivajn rezultojn: la partoprenantoj ricevis elementajn sciojn pri la metodojn de tradukado. Faris akustoreajn provojn, konvinkigis pri nekompereblaj simpleco kaj fleksebleco de Esperanto. Grandan meriton en la laboro de la kurso havis k-dej: V. Komaraj, V. Ĥroloviĉ, dank' al kiuj la kurso sukcese funkciis. Ili helpis en tradukado kaj konvinkis aliajn aparton al la kursoj.

La dua greve evento estis decida de la SRJM-Komitato organizi E-Universitaton. La lernantoj de la Universitato studos histori-
onde Esperanto, lernos E-literaturon, konatiĝos kun novaj prob-
lemoj ktp. Post la fino de la Universitato la studentoj plenum-
os eksamenojn kaj ricevos diplomojn. La Universitato enhavos kvar
kursojn. Se en ĉi tendaro funkciis unua kurso, de en la sekva
tendaro laboros jam unus kaj 2-a kursoj. Kiel rektoro de la Uni-
versitato elektigis al ĉiuj konata kandidato de sciencoj lenin-
grada esperantisto S. M. Podkaminer.

Ne malpli interesa ankaŭ estis amuzaj parto. Estis feritaj kel-
kaj koncertoj, inter ili du al neesperantista publiko. En la pro-
gramo de koncertoj estis kantoj, versoj, pantomimoj, skatoloj,
eroj el la tendara vivo, ktp. Oftaj ekplodoj de ridokaj aplau-
doj esprimis humuron de la publiko. Porvarme estis renkontita
la trupo de Riga E-klubo de blinduloj.

Ĉu vi volus ekscii pri ĉarno de nokta naĝado en la maro, pri
novaj rimedoj de batalo kontraŭ krokodiloj? Verŝajne vin ankaŭ
interesos vivo de esperantistoj en la paradizo? Sekve vi devus
viziti nian KGS-on (klubo de gejoj kaj spritoj). Tio estas tra-
dicia, geja tendara konkurso, inter reprezentantoj de okcidenta
parto de Sovetunio kaj la Oriento. Tiam tendaren entreprenon
oni atendas kun precipe granda intereso. Kiel ne? Kio estas nere-
sle dum ĝi entute en la vivo, tio povas efektiviĝi dum nia KGS.
Ekzemple dum ĉi KGS la partoprenantoj eĉ parolis dum unu minu-
to al L. Zamenhof. La KGS havis grandan sukceson. Sed ĉi jare ve-
nkis teamo de oriento.

Multaj sportaj konkuroj inter la reprezentantoj de diversaj lan-
dpartoj kaj inter esperantistoj kaj neesperantistoj montris,
ke geesperantistoj scipovas ankaŭ sporti. Multaj homoj disiĝis
kun ni, firme decidinte ellerni Esperanton kaj veni en Esperan-
tujon. En ĉies memoro restis la noktoj, kiam gejunuloj sidis en
la rondo ĉirkaŭ la fajro, kiam flamoj de la fajro fabele lumigis
la vizaĝojn, kaj E-kantoj forflugis sur flugiloj de gitar-sonoj;
nokta vegado ĉe la mar-bordo kun gitaro kaj kantoj, nokta pilk-
ludo ĉe helo de luno, nokta tea-trinkado ĉe la fajro, kiun majat-
re dividis Ljoŝa Gindin el Bernaul. Ĉu tio estas forgesebla? Ĉu
forgeseblas minutoj, kiam Galja Lenskaja el Krasnegorsk rakontis
pri tutmonda Junulara Festivalo en Berlino? Ni tiel klare ĉion
imagis al si, kvazaŭ ni ĉeestis la Festivalon. Interese pasis ve-
spero de E-poëzio, dum kiu sonis kantoj verkitaĵ kaj tradukitaĵ
de niaj poetoj B. Lukjanec, Miŝa Bronŝtejn. Ni aŭskultis origi-
nalajn versojn de B. V. Tokarev, V. Caldeev, N. M. Andrianova, N. Stol-
ban k. s.

En una el la lastaj tendar-vesperoj okazis festo de naskiĝintoj.
La enaĝuste naskiĝintoj estis apartigitaj, kaj tiuj "infanoj"
estis devintaj eltrinki po unu botelo de lakto helpe de suĉilo.
La "infanoj" montris sin bravuloj, kaj eĉ ne ploris. Luves-
pere okazis E-loterio, organizita de E-klubo de Ufa.
Le lasten lokon en tendara vivo okupis ankaŭ kontraŭkrokodila
batalo. Ĉiutage dum matenaj kunvenoj estis enmanigata verda gu-
na krokodilo al reprezentantoj de tiu urbo, kies esperantistoj
ploj multe krokodilis dum antaŭa tago. La Krokodiloj estis pri-
nokita dum koncertoj, kaj diversaj entreprenoj, en kantoj, versoj
ktp. Ni estis kune dum dek tagoj, sed kion de amika varmo resti-
gis tiuj ĉi tagoj en ĉies koro. Tiam da novaj amikoj ĉiuj skir-
is! Rememoroj pri la tendaro dum la tuta jaro varmigis la korojn.
En 254 partoprenintoj de la tendaro verŝajne ĝ ĉiu juris al si
partopreni la sekvan SRJM-on.

Solena ferno de la tebdare okazis 25-n de aŭgusto. La SEJM-komitatanoj kaj reprezentantoj de urboj elkore dankis la tendar-organizintojn, post kio okazis enmanigo de memorindaĵoj donacoj. Vespere estis organizita la lasta balo, dum kiu oni elektis "Miss" kaj "Mister"-Esperanto. Kiuj estis respektive N. Cveleneva el Ufa kaj V. Aroloviĉ el Moskvo.

Venos de l' fajro sopira ekbrail',
Diros ni : Ĉis ~~prezento~~prevido l' tendar.
Ĉiu pluretos, kaj eĉ krokodil'
Juras l' lingvon ellerno dum jar'.

(M. Bronštejn).

Ĉi strofo tutplene esprimas humoron de adiaĝa momento. Ĝi disveturis en diversaj lokoj de granda Sovetunio, forportinte en si miksan vernecon, erason de novaj kantoj, neforgesegblajn impresojn. kaj firmen decidon sekventjare nepre veni en la tendaron.

ERELJ VLADIMIR (BARNAUL).

** ** *

ENCICLOPEDIIO DE SEJT - 15

Esperanto-B U F I K O.

Prizorgis ĉefe geseperantistoj el Litovio (Vilnius, Klaipeda). Estis aĉeteblaj: 1.) Sendiskoj kun litovaj kantoj en Esperanto; 2.) Kantoretaj de SEJM; 3.) E-libroj (ĉ. 60), kiuj estis venditaj al kluboj laŭ lokoj okupitaj dum ĉi-jara konkurado; 4.) E-insignoj (7-specoj); 5.) E-emblemoj; La butikoj certe ne kontentiĝis seifon de la tendaranoj ~~ĉi~~ je literaturo en Esperanto.

P A K A J kuhvenoj. En daŭro de du-tri horoj kunsidis aparte matematikistoj, medicinistoj, bibliografoj kaj joko-interesitaj. Plej fruktodone mbezis matematikistoj.

Konkurso de I N T E R P R E T I S T O J

Preparis-gvidis Manju-

Sina Olja el Ufa. Konkursantoj devis interpreti gazetab tekston. Partoprenis la konkurson ĉ. 10 personoj. Unuaj rti lokojn okupis respektive: Cejtin G. (Leningrad); Cveleneva (Ufa), Vladimircov Ju (Barnaul).

K L U B O D E G A J A J K A J S P R I T A J.

Okazis inter tradiciaj teamoj: Okcidento-Oriento. Okcidentan teamon eniris: Aroloviĉ V. - estro (Moskvo), Belogolovskij M. (Doneck), Penĉenko A. (Harjkov), Kzempljarskaja V. (Ivanovo), Gajdamoviĉius S. (Vilnius), Harjkovskij A. (Moskvo), Kirilev M. (Moskvo), Ledigin V. (Zaporoĝe), Ribakov M. (Koloma), Sporiŝin V. (Tula). Orientan teamon eniris: Erelj V. - estro (Barnaul), Andreev V. (Geljabinsk), Cveleneva M. (Ufa), Caldsev V. (Barnaul), Gilinskij M. (Ufa), Galalova D. (Paŝkent), Jakovlev V. (Barnaul), Manjuŝina O. (Ufa), Medin G. (Sarektaŝ), Vladimircov Ju. (Barnaul).

Programonde KCC gvidis Bronštejn M. kaj Lukjanec D. Ĵuĝe komisiono: Kulikov V.V., Podkaminer B.M., Tokarev B.V.

Spekti la entreprenon venis ĉiuj tendaranoj; Venkis teamo de Oriento, ne laste dank' al helpo de "malanuloj".

K O N C E R T O J Ĉi tendare okazis kvar E-konzertoj: Litovia, Cetreofropa, Volgo-Urala, kun apartaj eroj de Ukrainio kaj Siberio kaj laste horo de blinduloj - esperantistoj. En vilaĝo Angure kaj la ripozdomo de Resterciema estis prezentitaj koncertoj por neesperantistoj.

LABORA TAGO. Ĉirkaŭ 120 getendaranoj veturis matene per tri aŭtobusoj al vilaĝo Engure, kie laboris por bezono de la loko kolĥozo. Oni sekris kampon, purigis konstruitan domon kaj laboris per fosiloj. La laboro daŭris ĝis la 16-a horo. Responde la estraro de la kolĥozo disponigis aŭtobuson por ekskurso kaj du kestojn de bongustega heringo. Laboran tagon modelis estris k-ĉo Matinŝ A. el Petropavlovsk-Kamĉatskij.

LOKO kaj TEMPO de SEJT - 15.
SEJT - 15 okazis 16-25 de aŭgusto 1973 jaro en ripozdomo "Albatros" sur la strando de Riga golfo, vilaĝo Keŝterciems, distrikto Tukums en Latvio. Organizajn problemojn solvis B-grupo "Radieto" el Riga sub prezido de Meĉinŝ A. Ĉirkaŭ 200 partoprenantoj loĝis en du domoj kaj 8.50 - en tendoj.

PAROLIGAJ kursoj. Entute funkciis kvar paroligek kursoj. La plej grandan grupon (ĉ. 60 personoj) gvidis Rogov A.B. (Ĥmelnickij) kun helpo de Boĉjovkin V.K. (Poltava). Sekvas rondetoj de Gercikov G.M. (Talgar) - ĉ. 20 personoj, Skvorcova Z.D. (Kujbiŝev) - ĉ. 10 personoj, Kulikov V.V. (Omsk) - ĉ. 10 personoj. Kvankam paroligek kursoj mem laboris kontentige, en la tendara programo ne estis eroj speciale destinitaj por (aŭ per) progresantoj. Sekve plena esperantigo de la progresantoj estis minimuma, al iuj el ili tendaro ne plaĉis.

POEZIA VESPERO. Fakte okazis konkurso de E-poetoj. En la branĉo: originala E-poezio partoprenis M. Bronŝtejn (Tiflvin), D. Lukjanec (Barnaul), Cveleneva N. (Ufa), V. Caldaev (Barnaul), N. Stolbun (Barnaul) kaj eksterkonkurse B.V. Tokarev (Moskvo), B.A. Rogov (Ĥmelnickij), N. Andrianova (Kiev). La unuan lokon okupis D. Lukjanec kaj la duan M. Bronŝtejn. En la branĉo - tradukita poezio partoprenis V. Samodaj (Moskvo) kaj V. Aroloviĉ (Moskvo). La unuan - duan lokojn dividis M. Bronŝtejn kaj V. Samodaj. En la branĉo - originalaj kantoj ĉi unua kaj la duan lokojn okupis respektive D. Lukjanec kaj M. Bronŝtejn. En la branĉo - tradukitaj kantoj partoprenis M. Bronŝtejn, N. Cveleneva, V. Samodaj. La unuan lokon okupis N. Cveleneva.

SOLENA BALKONARO de la SEJT - 15. Okazis en granda halo de la ripozejo. Ĉeestis ĉ. 180 gesperantistoj. La prezidio konsistis el la direktorino de la ripozejo, ĉefa organizanto de la SEJT - A. Kalinŝ el Riga, rektoro de E-Universitato S.N. Podkaminer kaj gvidantoj de SEJM: A. Gonĉarov; V. Aroloviĉ, A. Vizgirdas. Post la oficialaj paroloj de la prezidio la tendaranojn salutis reprezentantoj de diversaj E-klubo. Multaj emnigis memoronacojn. Fine k-ĉo Gonĉarov deklaris la SEJT-15 malfermita.

SOMERA UNIVERSITATO Kiel rektoro de la Somera Universitato elektigis ĉi-foje sciencoj Moskoviĉ V.A. (Moskvo). Estis prelegitaj jenaj temoj: 1). Malsaniĝo de internacia politika atmosfero kaj novaj perspektivoj por la E-movado (S.N. Podkaminer - Leningrad); 2). Pri psikologio de E-instruado (B.V. Tokarev - Moskvo);

3). Primstenetikaj terminoj en Esperanto (V. VKulikov-Omsk) 4). "Internaciaj kaj intern-sinjaj lingvoj (G.S. Cejtin-Leningrad); 5). Pri tutaŭgetia bibliografio en esperanto (V. Cvetkova - Leningrad); 6). Ĉu ni bezonas novaĵn prepoziciojn? (A.I. Vajtilavičius - Vilnius); Kvanto de aĉskultantoj estis de kunveno al kunveno inter 15-40.

S T A T I S T I K O S T A T I S T I K O S T A T I S T I K O

I. El kiuj lokoj venis la partoprenantoj kaj ilia kvanto.

| | | |
|------------------------------|------------------------------|------|
| 1. Barnaul - 21 | 2. Briĉani (Moldavio) - | - 1 |
| 3. Ĉeljabinsk - 7 | 4. Evenka nacia distrikto | - 1 |
| 5. Ivanovo - 8 | 6. Jelgava (Latvio) | - 1 |
| 7. Kaŝnas - 11 | 8. Kedainiai (Litovio) | - 3 |
| 9. Kiŝas (Estonio) - 1 | 10. Kineŝma (Ivanovo) | - 1 |
| 11. Klejpede - 18 | 12. Klimovsk (Moskvo) | - 1 |
| 13. Kolonna (Moskvo) - 1 | 14. Kostroma | - 1 |
| 15. Kresnogorsk (Moskvo) - 1 | 16. Kujbiŝev | - 2 |
| 17. Leningrad - 7 | 18. Liepeja | - 5 |
| 19. Lipeck - 4 | 20. Ljuberci (Moskvo) | - 1 |
| 21. Maŝaĉkala - 2 | 22. Majeikisi (Litovio) | - 3 |
| 23. Miŝas (Ĉeljabinsk) - 2 | 24. Moskvo | - 10 |
| 25. Mitiŝĉi (Moskvo) - 1 | 26. Omsk | - 11 |
| 27. Orjol - 1 | 28. Petropavlovsk-Kamĉatskij | - 1 |
| 29. Riga - 18 | 30. Ŝalĉininkaj (Litovio) | - 1 |
| 31. Saraktaŝ (Orenburg) - 1 | 32. Ŝĉelkovo (Moskvo) | - 1 |
| 33. Serpuĉov (Moskvo) - 1 | 34. Smolenck | - 1 |
| 35. Soĉi - 4 | 36. Siktivkar | - 2 |
| 37. Tallin - 9 | 38. Talger (Alma-ata) | - 2 |
| 39. Taŝkent - 3 | 40. Tbilisi | - 4 |
| 41. Tiŝin - 3 | 42. Tula | - 1 |
| 43. Ufa kaj Baŝkirio - 20 | 44. Uŝtj-Kamonogorsk | - 1 |
| 45. Velikie Luki - 2 | 46. Vilnius | - 16 |
| 47. Vitebsk - 1 | | |

II. El kiuj respublikoj:

| | |
|------------------|------------------|
| 1. Rusio - 127 | 2. Litovio - 52 |
| 3. Ukrainio - 27 | 4. Latvio - 24 |
| 5. Estonio - 9 | 6. Kartvelio - 4 |
| 7. Kazaĥio - 3 | 8. Uzbekio - 3 |
| 9. Belorusio - 1 | 10. Moldavio - 1 |

III. Estis reprezentitaj n a c i o j :

1. Rusoj - 150; 2. Litovoj - 51; 3. Latvoj - 23; 4. Ukrainanoj - 16; 5. Hebreoj - 16; 6. Estonoj - 9; 7. Tataroj - 4; 8. Germanoj - 3; 9. Boloj - 3; kaj po unu: uzbeko, baŝkiro, evenko, greko, komi, lako, avario. Entute 16 nacioj.

IV. L A Ŝ S E K S O : Viroj - 102, Virinaj - 150.

V. PARTIZANO: KPDSU - 16, VLKSM - 148.

VI. Kl a s s o j : Ĝis 8 klasoj - 12; inter 8 kaj 11 klasoj - 16; mesa ŝi meza tekniko - 76; nefinita supera - 59; supera - 89.

VII. Laŭ profesio j: 1). Studentoj - 62; 2). Inĝenieroj - 45; 3). Lernantoj - 27; 4). Teknikistoj - 23; 5). Oficiistoj - 20; 6). Altlernejaj instruistoj kaj sciencistoj - 17; 7). Instruistoj de lernejo - 16; 8). Laboristoj - 15; 9). Medicinistoj, farmaciistoj - 8; 10). Verkistoj, ĵurnalistoj - 6; 11). Pensiuloj - 5; 12). Pentristoj, fotoartistoj - 4; 13). Ceteraj - 5;

VIII. Laŭ jero de esperantiĝo : (1917-1929) - 2 homoj;

(1921-1930)-3; (1931-1936)-4; (1954-1960)-19; (1960-1965)-12; 1966-7;
1967-7; 1968-18; 1969-10; 1970-29; 1971-24; 1972-70; 1973-40.

LA ĜO de la partoprenantoj:

| | | |
|--------|-----------|-------|
| | ĝis 17 j. | -23 |
| de 18 | ĝis 20j. | -33 |
| de 21 | ĝis 25j. | -80 |
| de 26 | ĝis 35j. | -56 |
| de 36 | ĝis 50j. | -39 |
| pli ol | 50j. | - 20. |

** ** * kompilis A.Natinj

TRADUKISTA kurso:

Ekfunkciis unuan fojon en SEJT-oj.

vidis V.Samodaj kaj V.Aroloviĉ, ambaŭ el Moskvo. Ĝis la fine partoprenis
10 homoj, en unuaj tagoj estis ĉ.20. Komence oni analizis tradukojn de
teksto, farita flanke de 6 personoj (en la kadro de tradukista kurso)
antaŭ la tendaro. Poste oni komune, interŝanĝante opiniojn, tradukis la
tekston. En la konkurso de tradukistoj 1-an lokon gajnis Nina Cvile-
va(Ufa), kiu ricevis kiel premion la libron "Kit vivas"(el Danlando).
Tradukista kurso tre plaĉis al ĝiaj partoprenantoj.

KURSO DE ORIGINALA Esperanto-LITERATURO.

La kurson venigis kaj prelegis konata moskva espe-
rantisto docento B.V.Tokarev. La temoj prelegitaj jenaj:

- Enkonduko. Literatura agado de L.Zamenhof.
- Esperanta versfarado.
- Budapesta skolo en Esperanto-poezio.
- Brita skolo en Esperanto-poezio.
- Originala Esperanto-prozo.

Malgraŭ la kurso troviĝis en malfavoraj kondiĉoj, kelkfoje
malafalis kun aliaj gravaj entreprenoj. Tial kvanto de visitantoj
estis inter 15-8 personoj. Estonte la kurson oni enmetos en programon
de Esperanto-Universitato.

ESPERANTO - UNIVERSITATO.

Fondita laŭ decido de SEJM-Konsilantaro. Rektoro-
eminenta esperantisto el Leningrad, kandidato de sciencoj, Semjon
Podkaminer. En programo de, ĉi jare funkcianta, 1-a kurso
estis: 1/Antaŭrevolucia E-Movado en Ruslando (lektoris A.Narkovskij -
Moskvo); 2/Oktobra revolucio kaj E-Movado. SEU - fondiĝo, kaj agado
lektoris S.N.Podkaminer); 4/UEA kaj IOM (lektoris A.I.Vaitilaviĉius -
Vilnius); 5/SEJM (lektoris A.Gonĉarov - Barnaul); 6/TEJO (lektoris
Silas - Vilnius); 7/Mondpaca E-Movado (lektoris S.N.Podkaminer);
E-Komisionoj de SSOD (lekt. N.Andrianova). Fine estis organizita
lokvisio, kiun partoprenis ĉ.20 personoj. En proksima estonto estas
laborota programo kun demandoj por ĉiuj kvar kursoj. Estas pres-
taj ekzamen-libretoj.

ESPERANTO-VIKTORINO.

Estis preparita de V.Silas.
La demandoj jenaj: 1)Fondinto de UEA kaj jaro de fondiĝo; 2)Titolo
de unua E-revuo en Ruslando; 3)En kia loko kaj kiam estis la plej
malfrua SEJM-tendaro? 4)Kiu urbo okupis unuan lokon en komenco de
socialisma konkurado? 5)Citi freŝajn SEJM-Komitatanajn. 6/Kiom da
partoprenantoj enhavis la plej unuan E-vortaro (de Zamenhof)?
7)Kiam aperis la plej unua E-lernolibro? 8)Kiam aperis la plej unua
E-kanto kun E-kantoj en Sovetunio? 9)Kion signifas mallongigo SEU?

ALIAJ ENTREPRENOJ:

En SEJT-XV menciindas:

1. Loterio senmalgajna; 2. Ekspozicio: "Defendu naturon. Birdoj. (org. B. Lippe); 3. Sporta konkuro "tumbi-jumbi" (gajnis Okcidenta teamo); 4. Festo de naskiĝintoj (organizis barnaulanoj); 5. Komuna fotado; 6. Interkona vespero (organizis litovanoj); 7. Ekskurso al latvaj urbetoj; 8. Fakaj kunvenoj; 9. Regionaj kunvenoj; 10. Rakonto pri arabaj landoj (Samodaj); rakonto pri veturo al GDR (B. Cvetkova) ambaŭ rakontoj ilustritaj per lumbildoj. 11. Rakonto pri Universala E-Kongreso en Belgrad (I. ZnotinS).

kompilis-verkis A. Gončarov

ĈU ESPERANTAJ INFANOJ?

Karaj gesperantistaj gepatroj! Ĉu vi ne rimarkis kiel kreskis lastatempe nombro de infanoj, pli malpli parolantaj Esperante? Por kio ni esperantigas ilin? Ĉu nur por kontentigi niajn ambiciojn? Eble ofte ni ne metas antaŭ ni iun konkretan celon. Ni proponas unuigi fortojn de gepatroj, provante ekstri hazardas procedon. Pri kio kunlabori? Al ni ŝajnas pri ĉu aferoj: celo de infan-esperantigo kaj pri ties metodoj. Krone ni povus organizi tutlandan infanan bibliotekon, por niaj geknaboj ne sperti mankon de inda legaĵo. Se ĉiu el ni tradukos po unu ĉefverko de monda infana literaturo, ĉu ne aperos tiam io provizore kontentiga? Pli mallonge: skribu ekinteresitaj al mi laŭ adreso 310072, Harkov-72, ul. 23 Avgusta 62-127, Lupickom Julija.

Fine mi prezentas alziĝi por via intereso tradukitan artikolon el franca ĵurnalo "Science et Vie" N=2, 1973j., paĝo 68.

"Sufiĉe multnombraj estas landoj, kie pro ekzistado de diversaj kulturaj grupoj ekzistas bilingvismo (dulingvismo), -de Belgio ĉis Hindujo, de Kanado ĉis Jugoslavio. Sed ŝajnas malgrat tio, ke la bilingvismo ofte kaŭzas akrajn politikajn problemojn, ĉi estas prikonsiderata flanke de pedagogoj.

Tiuj ĉi konkludoj oni povas fari post fino de laboro, publikigita de Kleriga instituto en provinco Ontario (Kanado), surbaze de pedagogia eksperimento.

600 infanoj el anglalingvaj familioj en unu distrikto de Ottava lernis de la unua klase plene en la franca lingvo. Post fino de la dua klase, kiam ĉi infanoj atingis 7-jaran aĝon oni faris al ili testesploron kune kun anglaj kaj francaj infanoj, ricevintaj saman instruon en propraj lingvoj, t.e. en angla kaj franca.

Neniu ekmiris pri tio, ke malgrandaj angloj, lernintaj france, legis angle malpli bone ol angloj, lernintaj en la angla. Sed ĉiuj estis embarasitaj, ke postresto estis bagatela kaj precipe per tio ke angloj, lernintaj en la franca, legis france pli bone, ol tiuj francoj, lernintaj en la franca lingvo. Tiel same en matematiko la angloj, lernintaj france, pli sukcesis.

Sendube ekzistas kaŭzoj opinii, ke krucitaj kulturoj pli evoluigas kapablojn ol tiuj monolingvaj. Tiu ĉi esploro devas atentigi pedagogojn de la tuta mondo."

Ju. Lupickij (Harkov)

Materialojn por "Aktuale" sendu: 656099, p.k. 11, Esperanto-klubo.
Redaktis Ju. Vladimircov.